

& La spuroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado, Norda Kantaro #4408 kaj disduigo na versoj.>

(#Melodio:

<1,5:29> (a;do /doTi redo doTi Ti;Ti LaLa LaMi LaaLa;La LaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Mal/juna estis la leon', ; mallerta jam por kuro, ; la bestoj pli rapidaj lin ; eskapis per forkuro.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 Li triste sidis en la grot', ; lin tordis la malsato, ; elpensis fine ion, por ; sin savi el ĉi stato.

'3 Malsana li ŝajnis sin, ; komencis ĝemi, jelpi, ; la bestoj lin kompatis kaj ; venadis por lin helpi,

'4 kaj ili vere helpis lin ; — per sia propra sango. ; Do, la leon' festenis plu ; laŭ sia reĝa rango,

'5 komforte tronis en la grot', ; sen klopodado ĉasa, ; kaj eĉ dikiĝis pli kaj pli ; per la pensio grasa.

'6 Nu, venis foje por vizit' ; la vulpo ruzosperta. ; "Saluton, reĝo!" — diris li ; el malproksimo certa —

'7 "Kiel vi fartas?" La leon' ; respondis: "Ho plej kara! ; Bonvenon! Vi konsolos min ; en mia sort' amara.

'8 Sed venu pli proksimen do! ; Pro kio tiel fore ; vi staras? Venu, venu jam! ; Jen ĝemas mi dolore,

'9 balzamon al agoniant' ; per belaj vortoj donu!" ; La vulpo diris nun: "Ho reĝ'! ; Saniĝon! Kaj, pardonu,

'10 foriri mi preferas, ĉar ; kondukas, plej mistere, ; internen multaj spuroj, sed ; neniu alekstere.")